**N I A   V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

**JUNIO 2008**

## CENTJARIĜO DE UEA

La 28-a de aprilo, antaŭ 100 jaroj, oni fondis Universalan Esperanto Asocion. Jen la mesaĝo de la Prezidanto al la esperantistaro:  Roterdamo, 28 aprilo 2008:

*En Ĝenevo, la 28-an de aprilo 1908, Hector Hodler fondis Universalan Esperanto-Asocion. Nek la senmondmilita mondo de la tiama tempo, nek la ideo de universaleco, nek la sento de identeco de la esperantistoj restis  la samaj ĝis la hodiaŭa tago, en kiu ni, kun ĝojo kaj ankaŭ kun porokaza enpensiĝo, festas la centjariĝon de realaĵo nun ĝenerale rekonata kiel la reprezenta monda Esperanto-organizaĵo.*

*Mi volus tiun ĝojon dividi kun vi ĉiuj, kiuj ricevas mian mesaĝon. Indas dividi ankaŭ niajn ĉi-okazajn primeditojn. Historiistoj jam dediĉis al tiu ĉi jubileo klerigajn intervenojn. Sendube sekvos aliaj kontribuaĵoj; ni ne perdu ĉi tiun okazon, en kaj ekster la Asocio, rerigardi ĝian unuan jarcenton, kaj legi kontribuaĵojn de aliaj por firmigi nian kolektivan konversacion same vigle, kiel ni tion faris okaze de la centjariĝo de la lingvo mem.  Feste salutas. Probal Dasgupta, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio*

## EN HISPANIO

Dum 2007 la Universitata Instituto pri Aplikita Lingvistiko (Universitato Pompeu Fabra, en Barcelono), laboris super du aŭtomataj tradukiloj el la kataluna kaj la hispana lingvoj en Esperanton. La tradukilojn mendis la entrepreno ABC-Enciklopedioj antaŭ unu jaro, kaj en tiu periodo grupo de la Instituto, kun subteno de la Departemento pri Lingvoj kaj Komputadaj Sistemoj de la Universitato de Alakanto, kaj de Kataluna Esperanto-Asocio, disvolvis unuan version de la du tradukiloj, kiu troveblas en: http://xixona.dlsi.ua.es/apertium-unstable/es/

La numero de februaro de la revuo Quadern , eldonita en Sabadell, publikigis 6 paĝan intervjuon al **José Mª Galofré**, nuna prezidanto de Kultura Asocio Esperantista kaj dum multaj jaroj estrarano de HEF.

Dek esperantistoj, inter ili kelkaj membroj de HEJS kaj MEL deĵoris en **budo en la "I Feria de Asociaciones Juveniles"** en Cabanillas del Campo (Guadalajara)




## ESPERANTA  MONDO

La 24-an de aprilo okazis en Ĝenevo, organiziita de Unuiĝintaj Nacioj, **simpozio pri lingvaj homaj** rajtoj, dediĉita al la 100-jariĝo de Universala Esperanto-Asocio kaj la 60-a datreveno de la Universala  Deklaracio de Homaj Rajtoj.  Partoprenis  la Prezidanto de UEA kaj la estro de la Oficejo de UN por ligoj kun NRO-oj (ONG).  Bondezirojn por la simpozio sendis la ĝenerala direktoro de la Ĝeneva Oficejo de UN. Li gratulis UEA pro ĝia jubileo kaj menciis i.a.: "UEA faras signifan kontribuon al la antaŭenigo de lingvaj rajtoj en la mondo, precipe pere de sia aktivado subtene al la rajto uzi kaj esti edukata en sia propra gepatra lingvo". En la programo estis pluraj prelegoj de eminentaj specialistoj.  En la simpozio partoprenis ĉirkaŭ 70 homoj el 13 landoj. Proksimume duono estis ne-esperantistoj el diversaj NRO-j. Rimarkinda estis la ĉeesto de klaso de gejunuloj el svisa mezlernejo, sub la gvido de sia instruistino Mireille Grosjean. Financan subtenon por la aranĝo UEA ricevis de Svisa Esperanto-Societo kaj Institucio Hodler '68.

Al **Eŭropa Esperanto-Unio** la Eŭropa Komisiono ( Eŭropa Buroo EACEA: Civitanaj aktivecoj) aprobis la peton 80% financi la funkciajn kostojn, oficejon en Bruselo kaj salajron de unu oficisto! La aprobita sumo estas 55.000 eŭroj por la jaro 2008. Tio estas rezulto de serioza laboro de la nuna estraro kaj la oficistino Maja Tišljar. EEŬ estas unu el 36 eŭropnivelaj organizaĵoj kiu ricevis subvencion el inter pli ol 300 kiuj petis tion. HEF estas membro de EEU.

**Kandidatoj al Nobel Premio**: Literaturo: Esperanto PEN-Centro prezentis al Marjorie Boulton al la Literatura. Paco: la lingvo Esperanto estis prezentita por du svisaj parlamentanoj.

**Radio Havano** celebros en septembro sian 20-jaran jubileon de Esperantaj disaŭdigoj

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

HISPANA ESPERANTO-KONGRESO 2008. Cuenca 3a ĝis la 6a de julio.

19-26 julio. 93-a Universala Kongreso de Esperanto. Roterdamo (Nederlando)
26 julio- 1 aŭgusto. Internacia Junulara Kongreso (TEJO) Szombathely (Hungario)

## HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Sekretariejo de HEF funkcias en Rodríguez San Pedro 13, lunde vespere (18,00-20,30h), dum aliaj tagoj: telefoni al 91 446 80 79 (aŭtomata respondilo) aŭ kontakti rete: admin@esperanto.es

HEF jam ricevis unu kompletan kandidaturon por la estraro kiu devas esti elektota en Cuenca.

Bedaŭrinde ne okazos esperanto-ekspozicio en la Nacia Biblioteko ĉar ili nur ekspozicias proprajn librojn. Ana Manero petis lokon ankaŭ en la Historia Biblioteko « Marqués de Valdecilla » dependanta de « Universidad Complutense » kaj al aliaj institucioj.

Oni ankoraŭ ne publikigis en la BOE la rezulton de la subvencioj, sed oni jam informis nin ke nia subvencipeto al Ministerio pri Kulturo estis rifuzita.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Laj konversacia-rondoj kiujn organizas Madrida Esperanto-Liceo okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3-7, Tel. 91 446 80 79.

La konversacia rondo de la unua lundo de ĉiu monato (2a de junio) estos gvidata de Juan del Castillo je la 19,00 horo

23-a de junio je la 18,00h Juan del Castillo prelegos pri "6.912 lenguas" ĉe “Círculo Catalán”, Plaza de España 4, okaze de la Internacia Jaro pri Lingvoj

KURSOJ:

**Vallecas**. Pedro Hernández organizas bazan kurson, sabate je la 17,00-a horo kaj je la 18,30-a meza nivelo. Tel. 91 507 90 84/85 kaj 667 721 951

**La membroj kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon, povas pagi 12 eŭrojn rekte la lundon en nia konversacia rondo (Rodríguez San Pedro 13-3º-7) aŭ al Esperanto Liceo de Madrid, Banco Sabadell/Atlántico konto 0081/7110/98/0001266730**

---

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid